WIKIPEDIA

Naturhistoria Muzeo de Erfurto

Ege interesa **Muzeo pri natursciencoj** (germane: *Naturkundemuseum Erfurt*) troviĝas en la urbokerno de Erfurto en konstruaĵo de 1527 kiu iam estis deponejo de izatido. Dum 27 jaroj la muzeo troviĝis provizore aliloke, antaŭ ol esti solene inaŭgurita en marto 1995. De 1922-68 ĝi estis estinta en la domo Zum Stockfisch. Dum la 1970-aj jaroj oni planis transloki la muzeon en la domon Zum gekrönten Löwen und kleinen Wachsberg.

Enirejo al la elmontrejo.

Enhavo

Kolektoj
Kverko kaj arkeo de Noa
Taskoj publikaj
Fonto
Eksteraj ligiloj

Kolektoj

La muzeo havas permanentan ekspozicion rakontantan la naturan historion de la arbaroj, la kampoj kaj la grandurbo. Krome la geologian historion de Turingio. Kiel patro de la muzeo konsideratas Otto Rapp (1878-1953).

Okazas ankaŭ specialaj ekspozicioj, kiuj plejofte sole per la objektoj en la propra deponejo faratas. La muzeo disponas je kolektoj de botaniko, zoologio, mineralogio - 6.500 specimenoj de Godehard Schwethelm (1899-1992) - kaj de paleontologio. Gravas ankaŭ la kolektoj de Hugo Jung el Arnstadt.

Kverko kaj arkeo de Noa

En la vestiblo de la muzeo troviĝas 350 jarojn aĝa tigfrukta kverko, kies radikoj videblas teretaĝe dum la arbokrono etendiĝis ĝis la plej supra etaĝo. Ĝi estas alta je 14 metroj kaj la trunko havas maksimuman diametron de ĉ. 1 metro. La arbo dehakitis en 1991 en la erfurta Steiger-arbaro. Kuriozaĵoj estas la rekonstruo de Arkeo de Noa en la subtera etaĝo: tie ĉi oni estas invitata eniri la ŝanceliĝantan kaj ruliĝantan ŝipon kun remburitaj bestoj surŝipe: tiel oni volas atentigi pri la biodiverseco tutmonda

Taskoj publikaj

La celoj de la muzeo ampleksas: sciencan esploradon kaj edukon, la prizorgon de sciencaj kolektoj kaj aranĝadon de sciencaj renkontiĝoj. La scienca biblioteko havas ĉirkaŭ 15.000 librojn kaj pli ol 1.200 fakgazetojn. El ili 700 akiratas per simpla ŝanĝo kontraŭ la propraj, en Erfurto eldonitaj publikaĵoj!

Fonto

Museumsverband Thüringen (eld.): *Museen in Thüringen*, Edition Leipzig 2001, ISBN 978-3-361-00612-0, p. 62-63

Eksteraj ligiloj

- Muzea retpaĝaro (http://www.naturkundemuseum-erfurt.de/)
- Informoj primuzeaj en la malnovgreka (https://incubator.wikimedia.org/wiki/Wp/grc/Μουσεῖον_φυσικῆς_ἱστορίας_(Ἐρφούρτη))

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Naturhistoria_Muzeo_de_Erfurto&oldid=6482939"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 08:11, 4 dec. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.